

# Kultura Tago



**sabato la 25 de junio 2022 en Woudrichem**

Ĉi-jare ni finfine povas denove organizi kulturen tagon kaj renkontiĝi persone!  
Tiu ĉi tago, organizata far kelkaj volontuloj de la asocio Esperanto Nederlando, okazos en la pitoreska Woudrichem, kiu situas en la *Land van Heusden en Altena*.

**Woudrichem** estas malgranda fortikaĵa urbo en Nordbrabant ĉe la rivero *Merwede*, kie *Maas* kaj *Waal* renkontiĝas. Sur la alia riverbordo estas Kastelo *Loevestein*. Ĝi jam havas urborajtojn ekde 1365.

La fortikaĵoj ankoraŭ restas preskaŭ tute nerompitaj. Vivante apud la akvo, la homoj kutimis vivteni sin ĉefe per fiŝkaptado. Kaj do **vizito** de la **Muzeo pri Fiŝkaptado** certe estas programero. Same interesa estas **promenado** kun Esperanto-ĉiĉeronado, estas multaj aferoj spektindaj. La pramŝipo el Gorinchem alvenas meze en la historia urbeto.

*Simon Vinkenoog* estis ĉi tie en 2006 kaj verkis poemon pri *Woudrichem*. La esperantistino Jorien, loĝanta ene de la fortikaĵoj de la urbeto kaj unu el la organiza teamo, tradukis la poemon. Jen la unuaj versoj:

*"Kion urbo lernas de siaj rajtoj  
Batalo por libereco por ĉiu civitano."*

Dum la Kultura Tago eblas sub gvido de Karina Scharff mem **traduki poemojn**.

Posttagmeze okazas **koncerto** de la konata muzika duopo **Kajto**, kiu jam delonge kantas siajn proprajn kantojn en Esperanto. La grupo ĝuas grandan internacian famon.

**Programo:** komenciĝos je 10.30 h kaj finiĝos je 17.00 h, inkluzivas komunan lunĉon.

**Loko:** lunĉokafejo "*Gewoon Ploon*" Hoogstraat 19 en Woudrichem.

**Atingebla:** per pramŝipo ekde Gorinchem, rapidbusoj el Utreĥto aŭ Breda, bicikle aŭ per aŭto. Propra pendolservo (post antaŭmendo) ekde haveno kaj bushaltejo!

**Kotizo:** programo kaj lunĉo € 15,-- . Ne-membroj pagas € 20,--.

**Krome:** post la fino komuna vespermanĝo (fiŝo/viando/vegetara), prezo cirkaŭ € 25 (sen trinkaĵoj) mem pagenda surloke. Necesas mendi antaŭe.

**Aliĝilo:** troviĝas en retpaĝaro <https://esperanto-nederland.nl/> aŭ ĉe Smaranda: [luminita.tintu@gmail.com](mailto:luminita.tintu@gmail.com) Eblas aliĝi **ĝis la 10 de junio**.

**Pago:** ĝiri € 15 aŭ € 20 en la konton NL 10 TRIO 0786 8441 67 de trezoristo Esperanto Nederland, Capelle aan den IJssel menciante "Kultura Tago Woudrichem".

